

Gazeto *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

27-a Jarkolekto * Junio 2011 * N-ro 92

ISSN 1576 - 0618



TARIFA

**Vento, maro kaj oceano
ĉe la plej suda pinto de Eŭropo**

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Informo pri la 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto	3
Konkludoj de la Andaluzia Kongreso	14
Adresoj de la Esperanto-Movado en Andaluzio	15
La unua Futbal-Klubo en Andaluzio	16
Internaciaj Esperanto-Asocioj: T.E.Ĵ.A	18
Lingva Angulo	20
Poezio.....	23
Turismi en <i>Tarifa (Kadizo)</i>.....	24
Venontaj Esperanto-Kongresoj kaj Renkontiĝoj	29
Paĝoj de Nia Historio	30
Flamenko	33
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio.....	35
Libro-Servo de A.E.U.	38
Andaluza Kuirarto.....	39
Krucvorte nigmo	40
Humuro	42

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto

Sevilo, oktobro 2011

Unua jarcento de Esperanto en Sevilo

Ne ĉiuj jaroj okazas jubilea jarcento en nia movado, nia lingvo jam havas preskaŭ 125 jarojn, kaj ĉi-jare en Sevilo la tiea esperantista asocio festis sian unuan jarcenton. Do, bonega kialo por organizi samtempe la Andaluzian Kongreson de Esperanto. Tiel, de la 21-a ĝis la 23-a de oktobro okazis en Sevilo la 16-a Andaluzia Kongreso de nia movado.

La renkontiĝo de la esperantistaro komenciĝis vendrede vespere. Unualoke, la prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj tiu de Sevila Esperanto-Asocio salutis la gepartoprenantojn, kvankam je tiu horo de la vendredo ankoraŭ ne ĉiuj alvenis en Sevilon. Poste, Antonio Rodríguez Gasch kaj Juan de Dios Montoto parolis pri la projekto eldoni la libron *“Un siglo de esperanto en Sevilla”*. Verŝajne ĉi tiu eldonaĵo aperos dum la venontaj monatoj en Sevilo, ili parolis pri la historio de nia lingvo kaj movado en Sevilo ekde la fondiĝo de Sevila Esperanto-Asocio en la jaro 1911 ĝis hodiaŭ mem. La prezento estis tre alloga, ĉar pere de lumbildoj aperis la ĉefaj geesperantistoj de la urbo dum ĉi tiuj unuaj cent jaroj de nia movado en Sevilo.



La ĉefaj organizantoj de la Kongreso: *maldekstre-dekstren* Antonio Rodríguez Gasch, José Roldán León, Lola García Perea kaj José Pavón Arrecciado.

Ĉi tiuj unuaj programeroj okazis ĉe salono de la urbocentra hotelo “Lar”, kie oni organizis ankaŭ akceptejon kaj malgrandan libroservon, tie oni povis aĉeti esperantlingvajn librojn kaj kompaktajn diskojn.

Post la bonveno fare de la prezidantoj de AEU kaj SEA kaj la prezento de la onta verkaĵo pri la historio de esperanto en Sevilo, nia sevila samideano Antonio Rodríguez Gasch ĉiĉeronis tra la tipa sevila kvartalo *Santa Cruz*. Dum kelkhora promenado oni trapasis la plej mallarĝajn stratojn de ĉi tiu antikva kvartalo, kie abundas la blankaj domoj, la familiaj palacoj kaj la kortoj. Nia samideano lerte sciigis al la gepartoprenantoj pri ĉiuj legendoj pri amoj, honoro kaj dueloj okazintaj ĉe ĉiu strat-angulo de ĉi tiu kvartalo. Verŝajne, la promenado estis tre longdaŭra, inter la 19-a kaj la 22-a horo, tamen la lacecon oni forgesis kiam la promenantoj atingis la Trianan kvartalon. Tie, kie Sevilo trapasas la Gvadalkiviron, loĝis flamenkaj artistoj, forĝistoj kaj ceramikistoj kaj ankoraŭ oni parolas pri *grotos* kiam oni mencias la plej purajn flenkajn lokojn.



La tri *Lolas* kaj la datrevena torto.



Geesperantistoj ĉe trinkejo en *Triana*.

Nu, tie Sevila Esperanto-Asocio regalis ĉiujn gepartoprenantojn pere de bongusta kaj abunda manĝado, ĉefe friktita fiŝaro, biero kaj vino. Kaj je la fino, ŝaŭmvinino *Esperanto* kaj granda torto ornamita de verda stelo kaj la cifero *100 jaroj*, ĉar tiel oni festis la jarcenton, la unuan jarcenton, de Sevila Esperanto Asocio. Do, tiu unua kongresa vespero utilis por interkonatigi la ĉeestantojn, ĉar ĉi tiun kongreson ĉeestis ankaŭ novaj gesamideanoj.

Sabate matene daŭriĝis la programeroj. Je la 9:30 horo okazis gvidata vizito al la Belarta Muzeo de Sevilo, temas pri la dua plej grava muzeo en Hispanio, post la madrida Muzeo *del Prado*. Tie estis eble vidi pentraĵojn de sevilaj artistoj, ĉefe de la 17-a jarcento, kiel Murillo, Velázquez kaj Juan de Valdés; kaj ankaŭ tiuj de la 19-a jarcento, kiel Gonzalo Bilbao, Valeriano Bécquer kaj Eugenio Hermoso. Je la reveno en la kongresejon de la hotelo "Lar", la elstara madrida poeto Jorge Camacho prelegis pri literaturo kaj poezio en esperanto.

Jorge Camacho estis membro de la Akademio de Esperanto, aŭtoro de pluraj poeziaj verkaĵoj kaj nuntempe li estas la redaktoro de la revuo *Beletra Almanako*. Pri li, Maŭro Nervi, alia elstara esperantlinga poeto, diris, ke *li estas unika, kun siaj propraj trajtoj, inklinoj kaj solvoj, sendepende de aliaj kondiĉoj krom de tiuj de li mem. Oni povas klasifi lian poezion kiel konkrete realisma, se oni volas, sed tiam oni nepre atentu pri tio teni malfermaj la pordojn al interpretoj alidimensiaj.*



Jorge Camacho Cordón

Verdire estis bonŝanco aŭdi la vortojn de Jorge Camacho, ĉar lia stilo verki kaj prelegi estas superba.

Post ĉi tiu literatura prelego, alia okazis fare de D-ino Rafaela Urueña Álvarez. Ŝi estis profesorino pri Internacia Juro ĉe la Universitato de Valadolido kaj nuntempe, ŝi estas Prezidanto de la faka asocio Esperanta Jura Asocio, organizo kie renkontiĝas la geesperantistoj kiuj fakas pri juraj aferoj. Ŝi prelegis pri la graveco de la protektado de la medio fare de la internacia komunumo, ja gravega temo en la nuntempa mondo. Ŝi deklaris sin ne tiel pesimisma por pensi, ke la propra homaro kaŭzos la detruon de la Naturo, sed ankaŭ ne tiel optimisma por pensi, ke ĉio ĉi solviĝos pere de internaciaj renkontiĝoj, kiel tiu okazinta en Kioto. Bonega estis sia propono krei, apud la nuntempaj UN-blukaskuloj, aliajn *verdkaskulojn* kiuj devus eviti katastrofajn konsekvencojn de la homa agado al la Naturo.



Grupo da gepartoprenantoj en la Kongreso

Tagmeze la gepartoprenantoj manĝis ĉe la hotelo mem kie okazis la kongreso. Dum la manĝado okazis simpatia programero, tute ne-atendite la organizantoj de la Kongreso donis memor-tabulon al José

María Rodríguez kaj flor-faskon al lia edzino Cristina. Laŭ Antonio Rodríguez, kiu liveris la memoraĵon al nia samideano Ĉema, li meritis tion pro sia multjara dediĉo al la disvastigo de la internacia lingvo en Andaluzio. José María Rodríguez respondis, ke por li estis speciala momento, pro la fakto ke apude estis sia familio, tio estas, sia edzino kaj siaj du filoj kaj krome, ke ĉiuj laboroj plenumitaj favore a la disvastigo de la lingvo en Andaluzio estis tasko disvolvigita tutplezure.



Antonio Rodríguez donas omaĝan memortabulon al José María Rodríguez kaj Cristina Pérez ricevas flor-faskon

Post la manĝado kaj posta kafumado, José María Rodríguez parolis pri Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Nia asocio kunorganizas la Andaluziajn Kongresojn de Esperanto, tamen ĝi ne estas tro bone konita, eĉ de la andaluzia esperantistaro mem. AEU estas asocio kun du ĉefaj celoj, asertis Ĉema, unualoke ĝi celas disvastigi la internacian lingvon en Andaluzio kaj due, disvastigi la andaluzian kulturon en la tuta mondo pere de esperanto.

Je la 17:30 horo okazis la eksterordinara kunveno de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La membroj de la asocio parolis kaj diskutis pri la nuntempa situacio, pri ĵus okazintaj aferoj kaj pri la fondiĝo de junulara societo en Andaluzio. Resume, oni povas anonci nun la nomumon de nova estraro, kie unualoke enestas reprezentantoj de la urboj, provincoj aŭ zonoj kie ekzistas organizita esperanto-movado. Do, la nova estraro estas jena:

- Prezidanto: Ángel Arquillos López.
- Sekretario: José María Rodríguez Hernández
- Kasistino: Mariló Torres Mateos.
- Reprezentanto de Seviljo: José Roldán León.
- Reprezentantino de Malago: Karmela San Segundo Cordero.
- Reprezentanto de Onubo: Rafael Mateos González
- Reprezentantino de Arundo: Fátima Jiménez García.
- Reprezentanto de la Malaga Aksarkio: Nomumota.
- Reprezentanto de Jaeno: Nomumota.
- Reprezentanto de la Junularo: Juan Diego Díaz Bautista.



Maldekstre-Dekstren: Juan Diego, Patricia, Fátima kaj Daniel, gejunuloj partoprenantaj en la Kongreso

Ankaŭ estis gravega la anonco de la du junaj arundaj gesamideanoj Fátima kaj Juan Diego, kiuj sciigis pri la demarŝoj krei junularan asocion en Andaluzio kie renkontiĝos ĉiuj andaluzaj gesamideanoj aŭ simpatiantoj de nia lingvo malpli ol 30-jaraĝaj, temas pri la onta Andaluza Junulara Esperanto-Unuiĝo –AJEU-.

Poste José María Rodríguez denove parolis pri projekto de Andaluza Esperanto-Unuiĝo, ĉi-foje celanta organizi esperanto-kursojn

kun akademia valoro ĉe andaluziaj universitatoj. Ĉema diskonigis tiun projekton kiu unualoke oni planas realigi ĉe la Universitato de Malago.

La vespero daŭriĝis pere de projekciado de antikva filmo realigita ĉe la *Liceo Madrileño de Esperanto* dum la 70-a jardeko. Ene de ĝi partoprenis Angel Arquillos, kiu posedas la kopion de tiu kurioza terur-filmo en esperanto. La sabataj programeroj finiĝis pere de prelego de nia onuba samideano Rafael Mateos González, kiu parolis pri *Lingvaj Mitoj*, surbaze de la libro “La lingva instikto” de Stephen Pinker.



Meze de la kongresejo Rafael Mateos parolas pri *Lingvaj Mitoj*.

Dimanĉe matene la programeroj okazis aliloke. Oni ŝanĝis la luksan urbocentran hotelon *Lar* per komforta, tipa kaj amikema flamenka rondo, situata sur antikva sevila strato apud la rivero Gvadalkiviro. Estis plezure montri al ĉiuj vizitantoj la flamenkan rondon “*Pies Plomo*”, kun ĉiuj muroj ornamitaj de centoj da fotografiaĵoj de la plej konataj flamenkaj artistoj. La organizantoj de la kongreso invitis al la tieaj ĉeestantoj matenmanĝi ĉokoladon kaj tipajn dolĉaĵojn, ja bonega maniero malfermi la dimanĉajn programerojn.



Gepartoprenantoj en la Kongreso aŭskultas prelegon
ĉe la Flamenka Rondo

La unua dimanĉa programero estis prelego de Antonio Rodríguez Gasch pri la Sevila E-Movado. Antonio, kune kun Juan de Dios Montoto kaj aliaj sevilaj esperantistoj, rakontis anekdotojn kaj kuriozaĵojn pri la Sevila Esperanto-Movado ekde la 7-a jardeko ĝis hieraŭ mem. Tie, oni parolis pri kiamaniere Antolín Colmenar eskapis de mort-kondamno post la civila milito kaj kiel li adoptis novan identecon en Sevilo, li ŝanĝis sian tutan vivon, escepte sian dediĉon al esperanto; ankaŭ pri Felipe González del Río, prestiĝa sevila instruisto aŭtoro de laŭdata legskrib-metodo kiu, post la civila milito, estis forpelita en la Kanarian Insularon; pri Rafael Fiol, arma generalo kiu post la milito daŭre korespondadis kun Sovet-Unuiĝo en esperanto; pri Fernando Begines, fiziokrato kiu neniam forgesis disvastigi esperanton kie ajn; pri la agadoj de la *Academia Sevillana de Esperanto* aŭ pri la tiutempa Sevila Esperantista Junulara Organizo kaj tiuj gejunuloj kiuj antaŭenirigis la movadon en Sevilo kaj en la tuta Andaluzio.

Poste, estis la momento de la junularo. La arundaj gesamideanoj Fátima Jiménez kaj Juan Diego Díaz prezentis sian projekton fondi Andaluzian Junularan Esperanto-Unuiĝon –AJEU-. Temas pri asocio fondota post kelkaj monatoj kaj tute malfermita al ĉiuj gejunuloj en Andaluzio parolantaj aŭ simpatiantaj al la internacia lingvo. Ne estos la junulara sekcio de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, sed tute sendependa organizo, kvankam AEU promesis ĉiajn apogojn fare de la andaluzia asocio al la nova projekto. Same, Fátima kaj Juan Diego proponis sian urbon Arundon, por okazigi la venontjaran andaluzian kongreson de esperanto.



Juan Diego kaj Fátima prezentis
Andaluzian Junularan Esperanto-Unuiĝon

La programeroj ĉe la flamenka rondo finiĝis pere de la legado de la konkludoj alprenitaj dum la Kongreso, kiuj elstaris la okazigon de la centjariĝo de la esperanto-movado en Sevilo kaj ankaŭ la ĉefan rolon alprenita de la junularo rilate la disvastigon de nia lingvo en Andaluzio.

Je la 13-a horo okazis la lasta programero de la Kongreso. La organizantoj regalis nin per unuhora ne-forgesebla koncerto ĉe la bela preĝejo *Santa Rosalía*. La koncerto finiĝis pere de la kantado de la

esperanto-himno “La Espero” fare de sopranulino. Temis pri kultura fin-punkto de la aktoj memore al la centjariĝo de la esperanto-movado en Sevilo, kies celebrado estis la kerno de la nunjara Andaluzia Kongreso de Esperanto.


BILDA RAPORTO DE LA KONGRESO



La nepoj vin benos.

Mario kaj Hugo, la plej mal-aĝaj esperantistoj, apude feliĉaj, iliaj geavoj José Roldán kaj Mariló Vinuesa.

Rafi Urueña, Lola García kaj ŝia filo Miguel Angel. Dank'al la streboj de Lola estis eble solvi tiom da aferoj dum la Kongreso.



Gekongresanoj pretaj por promenadi tra Sevilo, vendrede nokte.



Luis José Sánchez, la informadika prizorganto de la Kongreso.



Juan Diego, Daniel kaj Fátima. La junularo ankaŭ aktivis dum la Kongreso.

Antonio Rodríguez kaj Juan de Dios Montoto, kun-aŭtoroj de la proksima libro pri la historio de la E-movado en Seviljo.



Kaj ne la tuta partoprenantaro aperas !!

DANKON AL ĈIUJ

KONKLUDOJ DE LA 16-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Sevilo, Oktobro 2011

✓ Vivo daŭras malpli ol cent jaroj, sed revo daŭras multe pli ol jarcento. Esperanto ne estas nur revo, nia lingvo ja estas realaĵo, kaj tiu realaĵo renkontigis nin ĉiujn dum tri tagoj en Sevilo, kie ni travivis amikeman estoson, almenaŭ tio estis la deziro de la organizantoj. Komenciĝas nun nova jarcento, espereble, kiel diras tiu esperanto-poezio *...niaj nepoj nin benos.*

✓ Andaluzio estas ekstercentra lando, eĉ periferia se ni parolas pri la plej fortaj kaj aktivaj en la mondo. Tamen, ni kredas, ke ni povas ludi sufiĉe aktivan rolon ĉe nia movado kaj tiu estas nia strebo, kune kun la diskonigado de la andaluzia kulturo en la mondon pere de esperanto.

✓ Aperis dum ĉi tiuj tri tagoj nova projekto en Andaluzio, temas pri la fondiĝo de Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo, asocio kie renkontiĝos la gejunuloj kiuj parolas aŭ simpatias al nia lingvo. La arundaj geesperantistoj respondecigiĝos pri la afero kaj sendube, ili ricevos ĉiujn niajn helpojn kaj apogon.

Al ĉiuj gepartoprenantoj multajn dankojn pro Via ĉeesto. Bonvenon al tiuj kiuj unuafoje kontaktis kun nia lingvo kaj movado kaj rebonvenon al tiuj kiuj rekontaktis kun la Esperanto-movado. Espereble ĉi tiuj tagoj ĉeestos ĉiam en nia memoro almenaŭ dum cent jaroj pliaj.



Por kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio, bv. uzi jenajn elektronikajn adresojn:


- ✓ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
andaluciaesperanto@gmail.com
- ✓ Malaga Esperanto-Asocio “Marbordo de la Suno”
<http://www.ipernity.com/home/123729>
- ✓ Asociación Sevillana de Esperanto
info@esperantosevilla.org
- ✓ Asociación Cordobesa de Esperanto
esperanto14@ono.com
- ✓ Jaena Esperanto-Asocio
ridinda@gmail.com
- ✓ Club de Esperanto de Ronda
esperantoarunda@gmail.com
- ✓ Asociación Onubense de Esperanto
rafmagon@yahoo.com
- ✓ Esperanto el Kadizo
esperantokadizo@gmail.com
- ✓ Bulteno “Monate ĉe Vi”
angelarquillos@gmail.com
- ✓ Revuo “Gazeto Andaluzia”
esperanto14@ono.com



TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

LA UNUA FUTBAL-KLUBO EN ANDALUZIO

Bazita sur mezepokaj ludoj, multe pli sovaĝaj, la historio de futbalo komenciĝas en la jaro 1848, kiam reprezentantoj de diversaj britaj lernejoj renkontiĝis ĉe la Kembriĝa Universitato por difini la *Kodon de Kembriĝo*, kiu utilis kiel la unua reglamento de la tiel nomata “moderna futbalo”. Tiuj reguloj estis poste definitive aprobitaj en Londono en la jaro 1863 kaj en 1886 fondiĝis la Internacia Futbala Asocio.



En la jaro 1863 britaj entreprenistoj aĉetis la minejojn de la provinco Onubo. Alvenis tiam inĝenieroj kaj laboristoj el Britio por ekspluati la minejojn kaj ankaŭ por konstrui fervoj-linion inter tiuj minejoj kaj la

onuba haveno, el kie oni transportus la mineralon en Brition. Ili samtempe starigis en la urbo tipe britan kvartalon. Do, Onubo preskaŭ fariĝis brita teritorio.

La britoj alportis en Onubon sian kulturon kaj ŝat-okupojn, kiuj post kelke da jaroj jam estis plene akceptitaj de la onubanoj. En la jaro 1884 alvenis en la urbo Williams Alexander Mackay, kuracisto, kiu kune kun Charles Adams, fondis, ene de la brita klubo de la urbo, “Piedpilkan Societon”, kun la celo praktiki du sportojn tipe britaj, tiun novan futbalon kaj la jam klasikan kriket-ludon. En la jaro 1888 tiu societo ŝanĝis sian nomon per la anglalingva *Recreation Club*, tio estas “Pordistra Societo”. Jam en tiuj jaroj, la *Recreation Club* profitis la alvenon kaj ĉeeston en la onuba haveno de britaj ŝipoj por organizi futbal-matĉojn inter la membroj de la onuba klubo kaj la ŝipanaroj.

Fine de la jaro 1888, ĝuste la 18-an de decembro, D-ro Mackay kaj la germana entreprenisto Guillermo Sundheim kunvokis aliajn interesitojn por fondi “Piedpilkan Klubon”, surbaze de tiu “Pordistra Societo”. Naskiĝis tiam la plej antikva futbal-klubo en Andaluzio kaj ankaŭ en Hispanio, la *Huelva Recreation Club*, nuntempe nomita “Recreativo de Huelva”.



Sportistoj de la *Huelva Recreation Club*

Post kelkaj tagoj alvenis en Onubon la brita ŝipo *D. Hugo* kaj ene de ĝi, sporta materialo por la nova klubo, tio estas: vestaĵoj kaj pilkoj. Kiel dirite, la membroj de la klubo profitis la viziton de britaj ŝipoj por organizi futbal-matĉojn, tamen baldaŭ aperis novaj kluboj, unu el ili en *Riotinto*, la onuba vilaĝo kie situiĝis la minejoj. Oni organizis ankaŭ matĉojn kun anoj de la brita klubo de Sevilo kaj kun futbal-teamo ĵus naskita en la brita kolonio Ĝibraltaro.

Tiu daŭra ekzisto de la *Recreation Club Huelva*, nuntempe *Recreativo de Huelva*, faris, ke antaŭ kelkaj jaroj la Reĝa Futbal-Federacio de Hispanio proklamis al tiu klubo kiel *dekanon* de la futbal-teamoj en Hispanio.

Internaciaj Esperanto-Asocioj

Tutmoda Esperantista Ĵurnalista Asocio –TEĴA-

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio estas la faka organizo de la Esperantomovado, kie renkontiĝas ĵurnalistoj, ĉu profesiaj ĉu amatoraj. La celo de TEĴA estas uzi la internacian lingvon por komuna kunlaboro kaj kunhelpo, por interŝanĝi artikolojn, enketojn kaj informojn. La asocio volas pruvi, ke nia lingvo estas utila por praktikaj celoj.



Ĝi estis fondita en la jaro 1946 de tri skandinavaj ĵurnalistoj kaj dum la unuaj jaroj la sidejo troviĝis en Svedio. Post la morto de unu el la fondintoj, S-ro Einar Adamson, en la jaro 1953, la asocio spertis periodon de stagnado, sed post kelkaj jaroj, en 1956, oni reorganiziĝis surbaze de la bulgara esperantistaro. Tiutempe eĉ oni eldonis la oficialan revuon *Internacia Ĵurnalista*.

Post la falo de la komunismaj reĝimoj en Orient-Eŭropo denove TEĴA stagnis. Tamen, en la jaro 1992 oni reorganizis ĝin sub la prezido de Stefan Maul. La asocio vere sukcesis, aliĝis 154 ĵurnalistoj, oni reeldonis la oficialan revuon kaj eĉ oni fondis premion por agnoski meritojn pri objektiva, sendependa kaj honesta ĵurnalisma agado. Sed baldaŭ denove la asocio stagnis, kaj pro manko da mono kaj de membroj la asocio preskaŭ malaperis.

En la jaro 2003 japana esperantisto, S-ro Yamasaki Seiko, lanĉis alvokon por restarigo de la asocio. Al tiu iniciato aliĝis konataj esperanto-ĵurnalistoj kiel István Ertl kaj Jukka Petiläinen, do, la asocio

estis oficiale reaktivigita okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2005 en Vilna (Litovio).

En la jaro 2008 okazis ankaŭ en Vilno la unua Tutmonda Kongreso de Esperanto-Ĵurnalistoj kaj, ekde tiam, la asocio vivas nova epoko. La prezidanto estas konata litova ĵurnalista Audrys Antanaitis, kiu krome estas vicprezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio.

Nuntempe apartenas al ĉi tiu asocio pli ol cent membroj en 36 landoj. Okazas kunvenoj de TEĴA kadre de la Universalaj Kongresoj aŭ de la kongresoj de Eŭropa Esperanto-Unio, la venonta en Galway (Irlando) en la monato julio 2012.

Pliaj informoj ĉe:
<http://www.tejha.org>



Revuoj kaj ĵurnaloj
Disvastigiloj de nia lingvo ekde ĝia apero

Lingva Angulo

Uzo de KIOM ĉe demandoj kaj ekkrioj

Ĉi-numere oni pritraktos la adverbbon KIOM kiam ĝi temas pri demando aŭ ekkrio. Tio estas, ni ne parolos pri ĝia uzo kiel subjunkcio uzata por enkonduki komparojn pri kvanto (*Vi rajtas manĝi kiom Vi volas –Puedes comer cuanto quieras-*); nek kiel subjunkcio kun la signifo: “laŭ nur la mezuro laŭ kiu...” (*Kiom mi konas pri li, li havas nur unu filon –Cuanto conozco de él, es que tiene solamente un hijo-*).

KIOM estas adverbo aperanta ĉe la tabel-adverboj ene de la rubriko –kvanto-, kaj ĝi estas formita de la jenaj elementoj:

- KI → *demando*.
 - OM → *kvanto*.
- Do, ĝi egalas al la hispanlingva *Cuánto*.

Ni vidu jenajn ekzemplojn:


- Kiom kostas tiu libro? (*¿Cuánto cuesta ese libro?*)

La respondo ĉiam estos numeralo au ne-difina kvanto. Do:

- Ĉi tiu libro kostas multe (*Este libro cuesta mucho*).
- Ĉi tiu libro kostas 10 eŭrojn (*Este libro cuesta 10 euros*).

Demando

Respondo

KIOM ?  Numeralo (unu, du, tri....mil...)
Ne-difina kvanto (multe, malmulte...)

Se, ene de la demando mem aperas mencio pri tiuj aĵoj pri kiuj oni demandas la kvanton, oni devas ligi tiun vorton kun “kiom” pere de la prepozicio DA.

- Kiom DA libroj vi legis pasintjare? (*¿Cuántos libros leíste el año pasado?*)
- Pasintjare mi legis kvin librojn (*El año pasado lei 5 libros*)
- Kiom da mono Vi enmetis en la bankon? (*¿Cuánto dinero ingresaste en el banco?*)
- Mi enmetis mil eŭrojn en la bankon. (*Yo ingresé mil euros en el banco*).
- Kiom da kilometroj estas inter Kordovo kaj Sevilo? (*¿Cuántos kilómetros hay entre Córdoba y Sevilla?*)
- Inter Kordovo kaj Sevilo estas 136 kmoj. (*Entre Córdoba y Sevilla hay 136 kms.*).

Ankaŭ oni uzas DA, eĉ se oni demandas pri ne konkretaj aĵoj aŭ objektoj:

- Kiom da fojoj vi vizitis Jaenon? (*¿Cuántas veces has visitado Jaén?*)
- Mi vizitis Jaenon jam kvar fojojn. (*He visitado Jaén ya cuatro veces*).
- Kiom da pano vi manĝas dum la maten-manĝo? (*¿Cuánto pan comes en el desayuno?*)
- Dum la matenmanĝo mi manĝas unu pan-pecon kun oliv-oleo. (*Durante el desayuno como una pieza de pan con aceite de oliva*).

Kiam ĉe la frazo ne aperas la “objekto” pri kiu oni demandas, sed oni demandas pri cirkonstanco rilata al tiu objekto, oni ne uzas DA. Ekzemple:

- Kiom longa estas tiu avenuo? (*¿Cuánto de larga es esa avenida?*).

- Tiu avenuo estas 2-kilometroj longa (*Esa avenida tiene dos kilómetros de largo*).

Vidite, ke la adverbo KIOM petas kvanton ĉe la respondo, tio estas ne-difina kvanto (multe, malmulte, iom....) aŭ kvanta numeralo (unu, du, tri...). Se la demando ne temas pri kvanta numeralo sed pri orda numeralo (unua, dua, tria...), KIOMA devas esti uzata. Tiel:

- Kioma horo estas? (*¿Qué hora es?*)
- La dua kaj duono. (*Las dos y media*)

Sciante, ke en esperanto, malsimile al la hispana lingvo, se temas pri horoj oni uzas ordan numeralon, ne kvantan, do: unua horo, dua horo, tria horo...

- Sur kioma etaĝo vi loĝas? (*¿En qué piso vives?*)
- Mi loĝas sur la oka etaĝo, do uzu la lifton. (*Vivo en la octava planta, así que usa el ascensor*)
- Je kioma fojo li aprobis la ekzamenon? (*¿A qué vez aprobó el examen?*)
- Li aprobis la ekzamenon je la dua fojo. (*Aprobó el examen a la segunda vez*)

La adverbo KIOM, krom por fari demandon, ankaŭ povas esti uzata por proponi ekkriion. Ekzemple:

- Kiom da libroj Vi havas ! (*¡Cuántos libros tienes!*)
- Kiom da homoj suferas malsaton en la riĉaj landoj ! (*¡Cuántas personas sufren hambre en los países ricos!*)

Se uzata ĉe ekkriaj frazoj KIOM elstaras kvanton, ne kvaliton. Do, ĉe la frazo “kiom da libroj vi havas!”, la ekkrio devenas de la granda kvanto da libroj. Se oni deziras elstari kvaliton oni devas uzi KIA. Tiel: “kiaj antikvaj libroj estas en la biblioteko!” (*¡Qué libros tan antiguos hay en la biblioteca!*)



Luis de Gongora y Argote
Kordovo 1561-1627

Poezio

Dum viaj haroj, kiel or' radia,
triumfas super suno de mateno;
dum via ĉarma frunto en ĝardeno
fiere blankas super blank' lilia;

dum via buŝo tenta kaj magia
rigardojn sorĉas pli ol la jasmeno,
kaj dum per freŝo venkas, kun senĝeno,
eburon glatan via kol' gracia,

ĝuadu haroj, kolo, frunto, buŝo
antaŭ ol, estas en junaĝo
jasmen', eburo, oro kaj lilio,

fariĝos viol-grizo tra l'vizaĝo
kaj, kun la tuta korpo jam en kuŝo,
polvo, vaporo, ombro kaj nenio.

(tradukis Fernando de Diego)

2011-a

450 datreveno de la naskiĝo de Luis de Góngora



Turismi en ... TARIFA (Kadizo)

Ĉe la plej suda pinto de la Ibera Duoninsulo troviĝas belega vilaĝo situata inter du maroj kaj fronte al Afriko, temas pri Tarifa, ĉe la kadiza provinco. Verŝajne, la unua kulturo kiu sidejis ĉe la nuntempa Tarifa estis la kartaga civilizacio. Tiel, en la jaro 1987 oni trovis kartagajn tombejojn ĉe la insulo *Las Palomas*, kiu troviĝas apud la urbo. Same, ĉe la apuda romia urbo *Baelo Claudia* oni trovis monerojn kie aperis la nomo *Bailo*, skribita per kartaga alfabeto.



Blazono de Tarifa
 Sur ĝi aperas latinlingve la
 frazo:
Estu fortaj en la milito.

Dum la 2-a jarcento a.K. fondiĝis la romia urbo *Baelo Claudia*, pri kiu ni parolis sur pasinta numero de la revuo. Tiu urbo troviĝas je malmultaj kilometroj de la nuntempa Tarifa. Tuj apud tiu urbo ekzistis alia nomita *Mellaria*, kiu, kvankam ankoraŭ ne ekzakte situata, verŝajne ĝi troviĝis sur la nuntempa Tarifa. Dum la 4-a jarcento p.K. *Baelo Claudia* estis detruata de tertremo kaj, post kelke da tempo, forgesita. Do, la rolo ludita de tiu urbo kiel ponto inter la Ibera Duoninsulo kaj la nordo de Afriko pasis al *Mellaria*, do al Tarifa, kie sidejis visigotoj kaj bizancanoj.

En la jaro 710 Tarif Abu Zara, komandanto de la armeo de la araba Tarik, alvenis en Tarifa-n por esplori la armeajn defendilojn de la zono. Unu jaro poste, 9.000 araboj eniris en la Iberan Duoninsulon tra Ĝibraltaro kaj konkeris la tutan duoninsulon post kelkaj jaroj. La araboj nomis la vilaĝon *Al-Yazirat Tarif*, -la insulo de Tarif-, memore al tiu komandanto, jen la origino de la nuntempa nomo de la vilaĝo. Tiutempe ĝi estis nur fiŝkaptista vilaĝeto, tamen en la jaro 960 la

kordova kalifo Abderahamano la 3-a ordonis konstrui grandan fortreson en la urbo, por defendi la tutan zonon de la fatimida minaco, la fatimidoj alvenis el la nordo de Afriko kaj ili minacis la omejan kordovan kalifejon.

En la jaro 1273 la granada reĝo petis helpon al la nordafrika popolo *benimeroj* por lukti kontraŭ la kastilia reĝo, kiel kompenso ili ricevis la urbojn Tarifa kaj Alheciro. En la jaro 1292 la kastilia reĝo Sancho la 4-a konkeris la urbon, du jarojn poste la *benimeroj*, kun la helpo de la portugala reĝo, sieĝis la vilaĝon, tiam okazis tre fama epizodo en la historio de la urbo, la araboj kaptis la filon de Alonso Pérez de Guzmán, la guberniestro de la urbo, kun la minaco mortigi lin se la patro ne kapitulacis, laŭdire la Alonso Pérez mem lanĉis el la fortreson sian propran punardon por ke la sieĝantoj povus uzi ĝin por mortigi lian filon, sed li ne kapitulacis. Denove, en la jaro 1340 la araboj sieĝis la urbon, tiam la armeoj de Kastilio kaj de Portugalio defendis Tarifa-n, kaj en tiu sama jaro okazis batalo, kun la venko de la kastilia armeo, ĉe la apuda rivero *Salado*, kiu metis la finan punkton al la luktoj inter araboj kaj kastilianoj en ĉi tiu zono.

En la jaro 1514 la hispana reĝo donis la urbon al la ĵus nomumita *Markizo de Tarifa*, kiu regis la urbon dum multaj jaroj. Tamen, en la jaro 1530 la tarifanoj petis la revenon en la vilaĝon de multaj terpecoj kontraŭleĝe alpro-pigitaj de la Markizo. Ĉi leĝa proceso finiĝis en la jaro 1596, kiam la urbon denove regis la kastilia reĝo. Do, la



Tarifa.

Maldekstre, la apuda insuleto *Las Palomas*

tarifanoj venkis en sia lukto kontraŭ nobelulo.

Post la konkero de Ĝibraltaro fare de la brita armeo, Tarifa ludis gravan rolon rilate la defendon de la zono kontraŭ la brita ŝiparo kaj ankaŭ kontraŭ la atakoj de la berberaj nord-afrikaj piratoj. Komence de la 19-a jarcento okaze de la napoleona invado de Hispanio, la hispana kaj la brita armeoj kundefendis la vilaĝon, la francaj trupoj preskaŭ konkeris la urbon, sed kiam ĉio ŝajnis perdita por la hispanoj, okazis granda pluvado kaj la francoj devis retiriĝi, finfine ili ne sukcesis okupi la urbon.

Komence de la 20-a jarcento oni konstruis havenon apud la insulo *Las Palomas*, tio ebligis la pligrandigon de la fiŝkaptista riĉeco de la urbo kaj ankaŭ la ekigon de mar-linia transporto inter Tarifa kaj la nordafrika urbo Tanĝero. En tiu sama jarcento, fine de la hispana civila milito oni starigis defendajn konstruaĵojn tra la tuta zono, por defendi la Ĝibraltaran Mar-kolon kaj eviti invadojn dum la dua mondmilito. Same, la tarifa haveno utilis kiel bazo por milit-ŝipoj kaj submarŝipoj.



Ekde la lasta jardeko de la pasinta jarcento, Tarifa estas gravega turisma loko, speciale por surmaraj sportoj kie la vento ludas gravan rolon, kiel la vel-tabulado.

Vel-tabuladistoj en Tarifo



Monumentoj

- Muregoj.

La historia kvartalo de Tarifa estas ĉirkaŭigita de la antikvaj mezepokaj muregoj. Ankoraŭ restas granda sekcio de tiuj muregoj. Kiam oni starigis ilin ekzistis tri grandaj pordegoj, kvankam nuntempe

nur unu el ili daŭras, la tiel nomita Pordego de Jerez, starigita dum la 13-a jarcento.



La Pordego de *Jerez* ĉe la antikvaj muregoj de Tarifa.

- Kastelo de *Los Guzmanes*

Dum la epoko de la kordova kalifo Abderehamano la 3-a oni starigis ĉi tiun fortreson, kies konstruo finiĝis en la jaro 960. La kastelo suferis multajn ŝanĝojn post la kastilia konkero. Vizitinda estas la turo de Guzman el Bueno, kun 40 metroj alte starigita dum la 13-a jarcento.

- Kastelo de *Santa Catalina*

Starigita sur la sama loko kie antaŭe ekzistis preĝejo dediĉita al Sankta Katarina. Oni konstruis ĉi tiun fortreson por defendi la kontraŭsipajn bateriojn de la insulo Las Palomas.

Gastronomio

La tarifa gastronomio estas tre riĉa kaj varia. Oni devas elstari la manĝaĵojn bazitaj sur maraj produktoj, kaptitaj en la apudaj maroj, mediteranea aŭ atlantika. Tiel, estas tre konataj la *voraz a la espalda*, kaj la *urta a la roteña*. Bongustaj estas ankaŭ la tinuso, la sardenoj je la maŭra stilo kaj ĉiuj konservaĵoj el fiŝo. Estas ankaŭ konataj, kiel deserto, la flaŭno kaj la dolĉaĵoj el migdaloj.

Festoj

La plej grava festo en Tarifa okazas la unua dimanĉo de la monato septembro, kiam la religian figuron de la Virgulino de la Lumo oni transportas al la urbo. Dum la antaŭa semajno okazas tipa andaluza foiro en la urbo. La lasta dimanĉo de septembro denove oni revenigas la figuron en sian preĝejeton, akompanita de preskaŭ mil ĉevaloj kaj rajdantoj.

Kiel ĉiuj kadizaj vilaĝoj la karnavalo ankaŭ estas vizitinda festo, okazas dum la monato februaro, kaj kune kun maskoj kaj kantaĵoj oni devas elstari la gastronomian riĉecon de ĉi tiu festo en Tarifo.

Meze de septembro, omaĝe al la Virgulino de *Carmen*, patronino de la fiŝkaptistoj, okazas parado dum kiu la fiŝkaptistoj subakvigas figuron de la virgulino en la maron.

Fine, dum oktobro okazas impona brut-foiro, kun la partopreno de centoj da ĉevaloj.



Ĉevalo kaj rajdanto en la Tarifa Foiro.

Venont-numere Turismi en

Vera (Almerio)

Venontaj Esperanto-Kongresoj kaj Renkontiĝoj

- Tago de Zamenhof, organizata de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en Vélez Málaga (Malago), la 11-an de decembro. Komuna maten-manĝo kaj vesper-manĝo en agrabla etoso. Pliajn informojn ĉe: angelarquillos@gmail.com



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
ESPERANTO FEDERACIO

- La 71-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Almagro (Ciudad Real), de la 27-a ĝis la 1-a de majo 2012. Pliajn informojn aperos baldaŭ ĉe la ttt-paĝo de la hispana asocio: www.esperanto.es

- La 97-a Universala Kongreso de Esperanto okazos venontjare en la vjetnama urbo Hanojo, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012. www.uea.org/kongresoj/index.html



- La 9-a Eŭropa Esperanto-Kongreso okazos en la irlanda urbo Galway de la 16-a ĝis la 20-a de julio, 2012. www.eeu-kongreso.webnode.com

- Organizata de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj de Arunda Esperanto-Klubo okazos en la malaga urbo Arundo (*Ronda hispanlingve*) la 17-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, post la somero de la jaro 2012. Dato ankoraŭ decidota.



Arunda Esperanto-Klubo
Club de Esperanto de Ronda

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Esperantista rotariano en Andaluzio

En la jaro 1905 la usona advokato Paul P. HARRIS proponis al grupo da influemaj amikoj en la urbo Ĉikago, renkontiĝi kun la celo starigi fratecan interhelpan grupon. Tiuj renkontiĝoj daŭre okazis rotacie ĉe la oficejoj kaj hejmoj de la membroj de la grupo. Pro tio, ili ricevis la nomon *Rotary Group*, -Rotacia Grupo en esperanto-. Baldaŭ, la grupo kreskis ne nur en tiu urbo sed ankaŭ en aliaj usonaj urboj kaj en la jaro 1912 ekzistis rotariaj grupoj en Usono, Kanado, Irlando kaj Britio.



La celo de tiuj grupoj estis uzi ilian socian influon por disvastigi helpojn al tiuj kiuj ne disponis pri sufiĉaj viv-rimedo, kvankam sen kia ajn signifo religia, filozofia aŭ politika. En Hispanio la unua klubo aperis en Madrido en la jaro 1920, apartenis al ĝi nobeluloj, gravaj ĵurnalistoj, diplomatoj kaj eĉ gravuloj tre proksimaj al la Reĝo Alfonso la 13-a.

La kreskanta ekonomio kaj la politika stabileco de Hispanio dum tiuj jaroj favoregis la aperon de pliaj kluboj en San Sebastian, Zaragozo, Bilbao, Vigo kaj A Coruña. En Andaluzio la unuaj kluboj aperis en la jaro 1927 en Malago kaj en Sevilo, en 1933 en Kordovo kaj en Kadizo en la jaro 1934.

Rilate la Esperanto-Movadon en la jaro 1928 oni fondis la Rotarian Amikaron de Esperantistoj, kun la celo plenumi unu el la ĉefaj

celoj de la rotarianoj, tio estas, la interkompreniĝo kaj la mondamikeco. Ekde 1930 tiu amikaro da esperanto-parolantaj rotarianoj regule kunvenadis, eldonis bultenon kaj grupigis membrojn en Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Irlando, Japanio, Nederlando kaj Usono.

En Hispanio, kaj ankaŭ en Andaluzio, la fino de la diktaduro de Primo de Rivera kaj la ekonomia krizo de la jaro 1929 influis negative al la rotarianoj. La plejmulto el ili estis politike konservemaj, do la alveno de la respublika reĝimo en la jaro 1931 ne estis favora al la rotaria movado. Alia afero estis la publika pozicio de la Katolika Eklezio rilate ĉi tiun movadon. Sur diversaj katolikaj publikaĵoj oni similigis la rotarian movadon al framasonismo, kaj eĉ la influa kardinalo Segura petis al la katolikaj fideluloj ne kunlabori kun asocioj kiel la rotarioj aŭ aliaj filantropiaj neŭtralaj asocioj. La ekleziaj instancoj pensis, ke rotarianoj kaj framasonistoj estis similaj movadoj, kaj vere multaj rotarianoj apartenis ankaŭ al framasonistaj asocioj, sed ankaŭ multaj el ili estis membroj de konservativaj partioj, kiel CEDA, kaj eĉ de la faŝisma Hispana Falango.

Unu el la ĉefaj rotarianoj en Malago estis Roberto Maraury Barredo. Li estis prestiĝa intelektulo, li naskiĝis en la vaska urbo Vitoria-Gasteiz en la jaro 1888, li sekvis studojn pri Juro, Medicino kaj Farmacio. Li doktoriĝis pri Juro kaj Medicino kaj li superis ekzamenon por aparteni al la hispana Dogan-Administracio. Post eklabori en la aragona urbo Huesca, en la jaro 1922 li atingis labor-postenon en San Fernando (Kadizo). Tie, li tuj kontaktis kun José Garzón Ruíz kaj ambaŭ revivigis la Andaluzian Esperanto - Federacion, stagnita



Roberto Maraury y Barredo
Vitoria-Gasteiz 1888 / Málaga 1958

post la morto de la aktiva sevila samideano S-ro Trinidad Soriano. Ĉe la Andaluzia Esperanto-Federacio li estis vicprezidanto. Post San Fernando li marŝis en Malagon, kie li denove revivigis la lokan asocion, kies prezidanto li estis en la jaro 1925.

Komence de la 30-jardeko li estis nomumata Dogan-Direktoro de la Hispana Protektorato en Maroko. Tie, li ankaŭ aktivis ene de la framasonista movado. En la jaro 1932 la tiama Supera Komizario de la Protektorato, la reakciulo Luciano López Ferrer, ekpersekutis la framasonistojn de la Protektorato. Tiel, li atingis, ke gravaj funkciuloj kaj armeaj oficiroj apartenantaj aŭ simpatiantaj al framasonismo, estu translokigitaj en la Duoninsulon. Inter ili troviĝis la Poliestro de la Protektorato mem, la plej grava respondeculo de la Hispana Poŝta Sevo, altaj ofiroj kaj ankaŭ la Direktoro de la Dogan-Servo, S-ro Roberto Maraury. La Maroka Framasonista Loĝio plendis pro tiuj devigaj translokigoj.

La sekvanta labor-posteno de Maraury estis denove la Dogan-Servo de Malago. Tie li kontaktis kun la rotaria movado, sendube dank'al sia membriĝo en la framasonismo, kaj malgraŭ la fakto, ke nenia rilato ekzistas inter ambaŭ movadoj, kvankam la Katolika Eklezio pli malpli similigis ambaŭ, tio kio tute certis, estis ke tiutempe granda nombro da rotarianoj estis ankaŭ framasonistoj. Li aliĝis al la Rotaria Grupo de Malago en la jaro 1934 kaj jam ekde la unua momento li estis aktiva rotariano, eĉ en tiu jaro li ĉeestis, nome de la Malaga Rotaria Grupo, la fondiĝon en Melilo de nova rotaria grupo de ĉi tiu nord-afrika hispana urbo.

Post la civila milito la rotaria movado en Hispanio tute malaperis. S-ro Maraury devis deklari antaŭ la aŭtoritatoj pro sia framasonista agado, tamen neniu malbona rezulto okazis. Post sia emeritiĝo li daŭre restis en Malago, kie li daŭrigis sian esperanto-agadon, ĉefe rilate la akceptadon de geesperantistoj vizitantaj la urbon. Li forpasis en Malago en la jaro 1958.

FLAMENKO

Verŝajne Manolo Sanlucar estas nuntempe unu el la plej gravaj flamenkaj gitaristoj. Kune kun Paco de Lucia, Vicente Amigo kaj Serranito, sendube li esta la gitaristo kiu pleje influis kaj evoluigis la flamenkan gitar-ludadon dum la dua duono de la pasinta jarcento. Lia stilo estas samtempe pura kaj avangarda, pura pro la fakto ke li ne serĉis influojn en aliaj muzikoj aŭ kulturoj kaj avangarda ĉar li pruvis krei verkojn ne nur por gitaro sed ankaŭ por kompleta orkestro.



Lia nomo estas Manuel Muñoz Alcón kaj li naskiĝis en la jaro 1943 en la kadiza vilaĝo Sanlucar de Barrameda. Lia unua majstro estis sia propra patro Isidro Sanlucar, panisto kaj ankaŭ flamenka gitaristo, kiu ofte alvenigis hejmen amikojn por kanti kaj gitar-ludi. Do, ekde sia infan-aĝo la flamenka etoso ĉirkaŭigis lin kaj ankaŭ liaj fratoj sekvis flamenkajn art-vojojn. Tamen, laŭ li mem asertis, siaj unuaj majstroj estis Niño Ricardo kaj Diego el del Gaster. Dum li sekvis la instruon de ĉi tiuj grandaj gitaristoj li laboris ĉe la panejo kun sia patro, sed dekkvarjaĝe li eklaboris profesie ĉe la flamenka kompanio de Pepe Marchena. Ankoraŭ li ne estis 30-jaraĝa kaj li

jam estis konsiderata kiel majstro kaj en la jaro 1973 li publikigis diskon kie aperis preskaŭ ĉiuj stiloj de la flamenka gitaro.

Li ĉiam esploris la eblecojn de la flamenka gitaro kaj unu el siaj plej gravaj kontribuoj estis liaj laboroj por enirigi la flamenkan gitaron ene de la simfonia muziko. Tiel li verkis “Fantazio por gitaro kaj orkestro”, Trebujena, Medea, Solea, Tauromaquia kaj Aljibe. Laŭ li mem deklaris: *Mia deziro estas ke la fakuloj pri universala muziko komprenu, ke estas eble alproksimiĝi al la flamenko, ke ili ne pensu ke la flamenko estas tria spektaklo, ke ili vidu la flamenkon kiel muzikon posedanta eksterordinaran poezian kvaliton.*

Por Manolo Sanlúcar la flamenko estas preskaŭ filozofio, ĝi estas la maniero pensi kaj senti de popolo kaj ĝia historia tradicio. Li atingis ne la orkestran akompanadon de flamenka kantisto, sed tute male, la akcepto ĉe simfonia orkestro de la flamenka sento, kvazaŭ la orkestro estu sola muzika instrumento kiu diskonigas la magian sonon de la flamenko.

Jen lia kompleta diskaro:



Recital Flamenco 1968

Inspiraciones 1970

Mundo y Formas de la Guitarra Flamenca Vol. I 1971

Mundo y Formas de la Guitarra Flamenca Vol. II 1971

Mundo y Formas de la Guitarra Flamenca Vol. III 1972

Sanlúcar 1975

Fantasia para Guitarra y Orquesta 1977

...Y Regresarte (Homenaje a Miguel Hernández) 1978

Manolo Sanlúcar en Japón 1979

Candela 1980

Azahares 1981

Al Viento 1982

Ven y Sígueme 1982

Sentimiento 1983

Trebujena 1984

Testamento Andaluz 1985

Medea 1987

Tauromaquia 1988

Solea 1989

Aljibe 1992

Locura de Brisa y Tino 2000

La voz del Color 2008

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Infano inter lupoj en Siero Morena

Ĉi-numere ni ne rakontos ne-certan aŭ misteran historion, sed tute male, hodiaŭ ni parolos pri reala okazintaĵo, temas pri la historio de infano kiu kreskis en Siero Morena inter lupoj. Do, jen li.

Marcos Rodríguez Pantoja naskiĝis en la kordova vilaĝo Añora (*prononcu Anjora*), tuj apud Siero Morena, en la jaro 1946. Liaj unuaj vivo-jaroj estis ege malfacilaj, pensu, ke temis pri la post-militaj jaroj en Andaluzio, kie abundis malsato kaj mankis viv-rimedo. Lia patro ekloĝis kun nova edzino kaj tiel, li lasis siajn du plej aĝajn filojn al familiano, sed Marcos restis kun li kaj kun la nova kunulino de sia patro. Ili tri loĝis en la montaro, ĉe kabano konstruita de ligno-pecoj kaj arbustoj, lia patro preparis karbon per la lignaĵoj kaj li devigis al sia filo rabi fruktojn en la montaro kaj bredi brutojn.



Afiŝo de la filmo “Inter Lupoj” de la jaro 2010 rakontanta la historion de Marcos Rodríguez

La malfacilaj viv-kondiĉoj devigis al la patro vendi lian propran filon, tiel en la jaro 1953, kiam Marcos apenaŭ estis 7-jaraĝa, la patro vendis lin al maljuna paŝtisto kontraŭ iom da mono, la paŝtisto bezonis helpon por prizorgi kapraron. La paŝtisto estis sovaĝa ulo, li apenaŭ parolis al li kaj ofte li havigis al la infano senhătan kuniklon kiel manĝon, tiel krude. Tamen, post malmultaj monatoj la paŝtisto malaperis kaj la infano restis tute sola en la montaro. Komence li loĝis ĉe kabano, sed poste li iris en groton kie li manĝis la bestojn ĉasitaj de li mem.

Kutime li sekvis cervon, li atingis rajdi sur ĝi kaj samtempe bati pere de lignaĵo, kiam la besto mortis li elŝiris ĝian haŭton, kiu utilis kiel varmigilo, kaj li poste manĝis la krudan viandon de la besto.

La lupoj aperis baldaŭ kaj la infano lernis dividi la ĉasitan beston kun ili, tiel la lupoj akceptis la infanon kiel alian membron de la luparo. Kiam Marcos hurlis la lupoj tuj alvenis, post iom da tempo la bestoj ĉiam akompanis la infanon. Laŭ li diris poste: *“kiam mi ploris ili ĉirkaŭigis min kaj saltis ĝis kiam mi ekridis, poste ili montris al mi la vojon en la groton kaj mi akompanis ilin”*.

Ĉi tiel li vivis dum 12 jaroj, ĝis kiam civil-gvardianoj trovis lin meze de la montaro kun la hararo ĝis la talio. Lia haŭto bruniĝis, la korpo plena je cikatroj, la piedo kovritaj per kalaĵoj kaj li apenaŭ sukcese prononcis vortojn. La civil-gvardianoj havigis la knabon al pastro, kiu siafoje, decidis sendi lin al Madrido en monaĥinejon. La monaĥinoj prizorgis lin kaj ili uzis strangan artefakton cele korekti la devion de la spino, kaŭzita de tiom da jaroj arkigita.



Marcos Rodríguez nuntempe

Liaj unuaj jaroj denove en la “civilizacio” estis ne-elteneblaj, li suferis pro la bruego de la grandaj urboj, li manĝis nur kiam li malsatis kaj ĝis satigi sian neceson. Post iom da tempo li devis milit-servi,

feliĉe oficiro komprenis, ke al tiu kazerna vivo ne povis alkitimiĝi iu kiu ĝis antaŭ tiam vivis tut-libere en la montaro. Post la milit-servo li serĉis labor-lokon. Bonŝance, li trovis kamparan domon kie li eklaboris kiel gardisto, kaj nuntempe li ankoraŭ estas tie, meze de la kamparo.

Antaŭ unu jaro, Gerardo Olivares, kin-direktoro, realigis la filmon *Inter Lupoj*, kie oni rakontas la historion de Manuel kaj laŭ li deklaris okaze de la premiero de la filmo *ĉi tiu vivo estas pli malbona ol tiu sur la montaro, eĉ multe pli...*



ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: andaluciaesperanto@gmail.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:
- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2012

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.

Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ni invitas al Vi aĉeti la du lastajn verkaĵojn eldonitaj de nia asocio.



PLATERO KAJ MI

Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo de poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon.

Tradukis en esperanton: Miguel Gutiérrez Adúriz

Prezo: 8 eŭroj.



SANGA NUPTO

Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituas la restarigon de la pura tragedia sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almerio, dum nupta ceremonio.

Tradukis en esperanton: Miguel Fernández

Prezo: 6 eŭroj.

Kontakt-adreso: esperanto14@ono.com

ANDALUZA KUIRARTO

Ringoj el oranĝo laŭ la onuba stilo

La andaluzia gastronomio estas plena je receptoj pri dolĉaĵoj kaj kvankam nuntempe, ĉe la manĝo-vendejoj estas eble trovi centojn da ĉi tiaj produktoj, ankoraŭ la plej maljunaj virinoj ellaboras dolĉaĵojn laŭ antikvaj receptoj. La vintro estas la plej taŭga sezono por gustumi ilin, do, ĉi-numere ni prezentas unu el ili, temas pri recepto de la provinco Onubo kaj dank'al ĝi estas eble kuiri bongustajn ringojn el oranĝo. Gustumu ilin, jen ĉio necesa:


- 3 ovoj.
- 9 kuleregoj da sukero.
- 9 kuleregoj da oliv-oleo.
- 9 kuleregoj da oranĝ-suko.
- Pulvora Fermento (2 saketoj).
- Faruno.
- Oliv-oleo.
- Sukero.
- Raspaĵo de oranĝo.



Jen la ellaborado:

- 1) Ene de potoj oni verŝas 9 kuleregojn da oliv-oleo, sukeron, oranĝ-sukon, la ovojn kaj la raspaĵon de oranĝo. La tutaĵo bonege miksiĝas.
- 2) Oni aldonas iomete da faruno kaj la pulvoran fermenton. Poste, oni aldonas pli da faruno, ĝis kiam ne estos eble aldoni plie. La tutaĵo devas ripozi dum almenaŭ 15 minutoj.
- 3) Pere de kulero prenu samkvantajn porciojn de tiu pasto. Oni devas doni cirklan formon al ĉiu porcio kaj ĉe la mezo de la cirklo faru truon.
- 4) Verŝu ĉiun porcion en la poton kie oni verŝis grandan kvanton da oliv-oleo. La temperatura de tiu oliv-oleo ne devas esti tro alta.
- 5) Friktu ĉiun porcion, degutigu poste la friktitajn ringojn kaj kovru ilin per sukero. Gustumu ilin malvarme.

Krucvortenigmo



- 1.- Regularo, precipe administra aŭ ŝtata.
- 2.- Homo amatore aŭ profesie praktikanta sporton kiu postulas grandan forton, lerton kaj longan trejnadon. ■ Interne.
- 3.- Kontraŭa okulmalsano karakterizita per granula konjunktivito. ■ (Inverse), Prefikso esprimanta malestimon.
- 4.- (Inverse) Diri ne. ■ Taksi kaj difini la grandecon de io, ĝin komparante kun unu samspeca grando, elektita kiel unuo.
- 5.- La unua mezepoka ormonero, stampita en Florenco. ■ (Sen la lasta vokalo) Altvalora metalo.

- 6.- Vokalo uzita kiel finaĵo de verboj. ■ Vokalo. ■ La du reloj sur kiu marŝas trajno.
- 7.- Religia Fundamenta Libro de unu el la plej disvastigitaj religioj en la mondo. ■ Konsonanto. ■ Konsonanto.
- 8.- (Akuzative) Diversmaniere movebla klapo, metiga ĉe aŭ apud la alopinto kaj uzata por doni ruliĝan movon al aviadilo.
- 9.- (Sen la lasta vokalo) Eŭropa lando. ■ En ne konkretan lokon.
- 10.- (Inverse kaj sen la lasta vokalo) Tiu kiu liberigis sin de tio, kio katenis lin.

A.- Prezenca formo de verbo signifanta konfirmi internacian traktaton aŭ konvencion en nomo de la ŝtato.

B.- (Inverse kaj en adverba formo) kapabla facile fari ion pro la rapideco kaj fleksebleco de siaj movoj. ■ (Inverse) Maldika kaj malpeza travidebla teksaĵo.

C.- Fruto de kverko. ■ (Akuzative) Egipta dio de la suno.

Ĉ.- (Inverse kaj sen la lasta vokalo) Subtera ĉambro, en kiu oni konservas provizojn, vinon, nutraĵon, karbon, ktp. ■ Denove provizi per bataliloj, por ataki aŭ defendi.

D.- (En adverba formo) Plej malgranda nevidebla ero de la materio. ■ (Inverse kaj Akuzative) eco de homo sincere kaj ame respekto plena al Dio kaj religiaj aferoj.

E.- (Akuzative) Tre mallonga, ne precize difinita daŭro da tempo. ■ Vokalo utila por la adjektivoj.

F.- Vokalo utila por adverboj. ■ (Inverse) Nomo de bela florplanto. ■ (Inverse) Demanda neŭtra pronomo, por demandi pri afero aŭ besto.

G.- Adverbo esprimanta, ke oni malakceptas, rifuzas, rigardas kontraŭa al la realaĵo la ideon, pri kiu estas parolate. ■ Vokalo utila por la verboj. ■ (Adjektive kaj inverse) Havanta pertuŝan aŭ internan sensacon, kiu aperas en nia konscio kun koloro de doloro aŭ plezuro.

Ĝ.- (Inverse kaj sen la lasta vokalo) Greka havenurbo. ■ ■ Maljes.

H.- (Inverse) Estro de ĥoro en antikva komedio aŭ tragedio.



Sendu la solvon en nian adreson kaj Vi atingos belegan libron.

Krucvortenigmo.

Elektronika adreso: esperanto14@ono.com

Poŝta adreso: Apartado de Correos 3142 E-14080 Córdoba (Hispanio)

HUMURO

**Kara Johano, kiel vi fartas?
Via patrino kaj mi mem fartas bone. Ni sentas
vian mankon. Do, bonvolu elŝalti la komputilon
kaj venu en la salonon, la nokto-maĝo jam estas
sur la tablo.**

Amas vin, paĉjo kaj panjo.



La venonta numero de nia revuo aperos fine de la monato decembro. Ĉu vi deziras kunlabori? Artikoloj, desegnaĵoj, kontribuoj... estas ĉiam bonvenaj. Sciu, ke *Gazeto Andaluzia* estas la revuo de ĉiuj andaluzaj geesperantistoj. Do, ankaŭ via revuo, ĉu ne?

GAZETO ANDALUZIA. esperanto14@ono.com

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonanto de Sevilo: José Roldán León
Voĉdonanto de Malago: Karmela San Segundo Cordero
Voĉdonanto de Onubo: Rafael Mateos González
Voĉdonanto de Arundo: Fátima Jiménez García
Voĉdonanto de Jaeno: Nomumota
Voĉdonanto de la Malaga Akserkio: Nomumota
Voĉdonanto de la Junularo: Juan Diego Diaz Bautista

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

ZAMENHOF-TAGO VÉLEZ-MÁLAGA
LA 11-AN DE DECEMBRO 2011

